
Svisa Esperanto-Societo

# informas

jaro 2004 numero 2-a: marto / aprilo

kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de marto



**Andy Künzli preleganta en Vevey** (fotis Stefano Keller).

# Rememorigilo

## SES informas
## Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch & gacond@bluewin.ch

& ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29: indiki: por Claude GACOND

Redaktaj kunlaborantoj: Nancy FONTANNAZ, Andy KÜNZLI, Richard SCHNELLER.

## SES informas
## Redaktaj datlimoj
### por la venontaj numeroj

**2004-3**: majo-aŭgusto: aprile 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de majo.

**2004-4:** septembro-oktobro: aŭguste 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

**2004-5:** novembro-decembro: oktobre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

**2005-1**: januaro-februaro: decembre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

## SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23, 3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59. Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch.

Dietrich Weidmann, vicprezidanto, PF 301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto: info@esperanto.ch.

Nicole Margot, sekretario, Chemin des Lys 4, 1010 Lausanne.Tel.: 021 653 14 67. Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.

Hans-Werner Grossmann, kasisto, Esperanto-Servo, PF 262, 4132 Muttenz 1. Tel.: 076 460 8992. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch.

Chiara Fabbri, peranto itallingva kaj junulara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur. Retpoŝto: chiara-fp@bluewin.ch.

## Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

## Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

| | | |
|---|---|---|
| fr.10 | infanoj | ĝis 18 jaroj |
| fr. 20 | junuloj | de 19 ĝis 29 jaroj |
| fr. 35 | plenkreskuloj | ekde 30 jaroj |
| fr 50 | paroj | " |
| fr. 70 | patronoj | " |
| fr 25 | nura abono al | *SES informas* |



# Svisa kalendaro

## Marte

**Marte-aprile:** Le Locle. Ekspozicio pri esperanto.
**20:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
**23:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**27-28:** Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

## Aprile

**3.** Rotkreuz: SAEF: Ĝenerala kunveno.
**5:** Lausanne: LES: Kunveno kun Cl. Gacond.
**6:** Genève: La Stelo: Kunveno.
**7:** Luzern: LES: Kunveno.
**7:** Wil: EKW: Kunveno.
**8-12:** Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.
**9:** Strasbourg: Manifestacio.
**15: Redakta datlimo de SES informas.**
**24: Les Brenets: SES: Ĝenerala Asembleo.**
**24-25:** Jubilea Renkonto Brenets – Tête de Ran

## Maje

**3:** Lausanne: LES: Kunveno.
**4**: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**4:** Genève: La Stelo: Kunveno.
**5:** Luzern: LES: Kunveno.
**5:** Wil: EKW: Kunveno.
**8-15:** Sopron: 56-a IFEF-Kongreso.
**9:** Strasbourg: esperanto-manifestacio.
**15:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato
**15-16:** JES: Kurs-semajnfino.
**18:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**22-23**: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

## Junie

**Dato fiksota:** Lausanne: LES: Ekskurso.
**1:** Genève: La Stelo: Kunveno.
**2:** Luzern: LES: kunveno.
**2:** Wil: EKW: Kunveno.
**8:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**19:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
**22:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
**26**: Basel: ESB: kunveno minigolfa.

## Julie

**5-10:** Grindelwald: KCE: naturamika semajno.
**7:** Luzern: LES: Kunveno.
**13-18:** Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.
**17:** Genève: La Stelo: Kunveno Insulo Rousseau.
**20-25:** Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.
**24-31:** Beijing (Ĉinio): 89-a Universala Kongreso.

## Aŭguste

**2-6:** Engadino: KCE: romanĉa semajno.
**7:** Luzern: LES: Ekskurso.
**7-14:** Chaux-de-Fonds: KCE: Kultura semajno.
**14:** Genève: La Stelo: Kunveno Insulo Rousseau.
**14-21:** Chaux-de-Fonds: KCE: Seminario.
**15: Redakta datlimo de SES informas.**

## Septembre

**1:** Luzern: LES: Kunveno.
**7:** Genève: La Stelo: Kunveno.
**25-26:**.Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

## Oktobre

**5:** Genève: La Stelo: Kunveno.
**6:** Luzern: LES: kunveno.
**8-9:** Wien: Internacia Esperanto-Simpozio.

## Novembre

**2:** Genève: La Stelo: Kunveno.
**3:** Luzern: LES: Kunveno.
**20:** Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

## Decembre

**1:** Luzern: LES: Kunveno.
**7:** Genève: La Stelo: Kunveno.

# Vivo de SES

## Dua festa renkonto en Les Brenets
### kun jubilea Ĝenerala Asembleo de SES
### sabaton 24-an de aprilo

**La Ĝenerala Asembleo de Svisa Esperanto-Societo ĉijare okazos kadre de grava jubilea festa renkonto en Les Brenets apud Le Locle, vilaĝo kie vivis la esperanto-pioniro Edouard Ducommun**. Ekzakte antaŭ cent jaroj, en aprilo 1904, konkludiĝis lia pionira eksperimento instruadi esperanton en publika lernejo per rikolto de poŝtkartoj el la tuta mondo. Fakte unuafoje esperanto estis lerneje instruata. Tion ĉi ni rememorigos per instalo de memor-ŝildo sur lia tiama loĝ-domo en la vilaĝo Les Brenets.

La festo komenciĝos dum akcepta kafumo en du salonoj de la nova gimnastik-ejo, sub la aŭspicio de la vilaĝaj aŭtoritatoj. La historiisto Pierre Deléglise prezentos ekspozicieton pri la instruisto kaj muzikisto Edouard Ducommun, kaj gelernantoj de "La Grande Ourse", lernejo kie esperanto estas instruata, alportos kunlaboran kontribuon. Espereble grandnombre alkuros esperanto-praktikantoj el tuta Svislando, kaj eĉ el eksterlando, por kune festadi la cent-jariĝon de la menciita pedagogia evento kaj ankaŭ de la fondo de Svisa Esperanto-Societo.

Ŝipa veturo sur la lago de Les Brenets kondukos nin al la restoracio de la akvofalo "Saut du Doubs", kie okazos la komuna tagmanĝo. Dum promena re-veno al la vilaĝo la marŝantoj haltos ĉe esperanto-stelo, kiun Edouard Ducommun mem pentris kontraŭ la rokaro komence de la dudeka jarcento kaj kiun la esperantanoj de Les Brenets fidele refarbas. Alvene en la vilaĝo, post la inaŭguro de la memor-ŝildo, en teuma etoso disvolviĝos en la gimastikejaj salonoj la jubilea Ĝenerala Asembleo de SES kaj franclingve priesperanta informado por interesata publiko fare de Claude Gacond.

**Kaj por tiuj, kiuj deziros ne tuj rehejmiĝi, la saman sabaton okazos vespermanĝo, amika vespero kaj tranoktado en la hotelo *"La clef des champs"* sur la Monto *"Tête de Ran"*, kie fin-aprile floradas jonkviloj en la paŝtejoj. Kaj la dimanĉon 25-an de aprilo ni tiel povos plue konatiĝi kaj migradi sur paŝtejoj inundataj de tiuj belaj flavaj floroj.**

Nian bultenon akompanas aliĝilo, kiu donas la eblon precizigi sian aliĝon parta aŭ plena al ambaŭ jubileaj renkontoj. En Les Brenets, por la ŝipa veturo kaj por la tagmanĝo, ni nepre devos rezervi la necesajn sidlokojn kaj menuojn. Kaj en la hotelo de Tête de Ran la nombro de la litoj estas limigita, nur maksimume la 40 plej rapidaj aliĝantoj povos esti akceptitaj.

Do ĝis baldaŭ en Les Brenets, kaj eble eĉ ankaŭ sur la monto Tête de Ran, por digne festadi la centjariĝon de Svisa Esperanto-Societo kaj de la unua esperanto-instruado en publika lernejo.

# Horaro de la renkonto en Les Brenets

**10h00: Malfermo de la kunvenejoj kaj de la ekspozio en la nova gimnastikejo.**
Kafuma akcepto de la alvenantoj.
**10h40: Alveno de la trajno.**
Akceptanto gvidos la alvenantojn al la kunvenejo.
**11h00: Oficiala malfermo.**
Salutoj de Bruno Graf, prezidanto de SES, kaj de reprezentanto de la vilaĝo.
Kun gelernantoj de "La Grande Ourse" la historiisto Pierre Deléglise prezentas sian ekspozicieton pri Edouard Ducommun.
Kontribuo de la gelernantoj de "La Grande Ourse".
**12h00: Iro al la ŝipo.**
**12h15: Forveturo de la ŝipo.**
**12h35: Alveno en Saut du Doubs.**
Aperitiva promeno al la akvofalo.
**13h00: Komuna tagmanĝo.**
Salutvortoj kaj variaj kontribuaĵoj agrabligos la manĝon.
Kunsido de la Svisa ILEI-sekcio dum la kafumo.
**14h30: Marŝa reveno al la vilaĝo Les Benets**.
(Kiuj ne kapablas marŝadi, tiuj povos reveni ŝipe kaj el la haveno buse.)
**15h30:** Inaŭguro de la memor-ŝildo pri Edouard Ducommun.
**16h00: Teumo en la nova gimnastikejo.**
Ĝenerala Asembleo de SES en aparta salono.
Priesperanta informado franclingva en la ekspozicia salono.
**17h30: Oficiala fermo.**

**17h50: Forveturo de la Tajno.**

# Partoprenkotizo

La partopren-kotizo inkludas la akceptan kafumon, la ŝipan veturon, la tag-manĝon (krom la trinkaĵoj) kaj la konkludan teumon. Plenkreskuloj: Fr 55.- JES-anoj: Fr. 35.- Infanoj 9-16-jaroj: Fr 15.- Infanoj 0-8 jaroj: senkoste.

Por la pago de la partoprenkotizo ĉiu aliĝinto ricevos pagilon al la poŝta ĉeko-konto 17-334343-4 *Renkontoj* de *Esperanto perkoresponde*, kiun akompanos ĝenerala informilo al la renkonto.

# Aliĝo

**La aliĝojn oni sendu kiel eble plej rapide (Utiligu al aldonitan aliĝilon!)**
ĉu poŝte al Claude Gacond, strato Chevreuils 14, 2300 La Chaux-de-Fonds,
ĉu rete al gacond@bluewin.ch.
donante la sekvaj indikojn por ĉiu aliĝanto:
Nomoj familia kaj individua
Adreso poŝta (kaj eble reta)
Telefon-numero.
Preciza indiko pri la aliĝa kategorio: Plenkreskulo Fr 55.- Jes-ano: Fr 35.- Infano 9-16 jaroj: Fr 15.- Infano 0-8 jaroj: senkoste.
(Por ĉiu aliĝo venanta post la 17-a de aprilo aldoniĝos plusa administra kosto de Fr 5.- kaj ne povos esti garantiita ricevo de la ĝenerala informilo al la renkonto).
La aldonita aliĝilo faciligu vian aliĝon kaj tiujn de viaj akompanontoj.

Nome de la organizantoj: Claude Gacond.

# Trajnoj

**Por trajne alveni en Les Brenets je la 10h40, jen kiam oni forveturu el:**

Basel: 08h24: Ŝanĝi en Biel/Bienne kaj Le Locle.
Bern: 08h56. Ŝanĝi en Biel/Bienne kaj Le Locle.
Biel/Bienne: 09h38. Ŝanĝi en Le Locle.
La Chaux-de-Fonds: 10h20. Ŝanĝi en Le Locle.
Genève: 07h48. Ŝanĝi en Neuchâtel, La Chaux-de-Fonds kaj Le Locle.

Lausanne: 08h27. Ŝanĝi en Neuchâtel, La Chaux-de-Fonds kaj Le Locle.
Le Locle: 10h33
Luzern: 7h54, Ŝanĝi en Biel/Bienne kaj Le Locle.
Neuchâtel: 09h11. Ŝanĝi en La Chaux-de-Fonds kaj en Le Locle.
Olten:08h47. Ŝanĝi en Biel/Bienne kaj Le Locle.
St. Gallen: 06h42. Ŝanĝi en Biel/Bienne kaj Le Locle.
Winterthur: 07h25. Ŝanĝi en Biel/Bienne kaj Le Locle.
Yverdon: 08h48. Ŝanĝi en Neuchâtel, La Chaux-de-Fonds kaj Le Locle.
Zürich: 08h07. Ŝanĝi en Biel/Bienne kaj Le Locle.

# Aŭtomobila parkejo

Ĉe la nova gimnastikejo de Les Brenets troviĝas aŭtomobilaj parklokoj.

# Tête de Ran

## Sabaton 24-an kaj dimanĉon 25-an de aprilo

**Organiza partoprenkotizo: fr 10.- JES-anoj kaj infanoj senpage.**

**Fin-aprile sur la paŝtejoj de la monto Tête de Ran (alteco 1400 metroj), proksima al La Chaux-de-Fonds, floradas jonkviloj, kio estas admirinda natur-fenomeno.** Tial por tiuj, kiuj ŝatus profiti la eblon resti unu tagon pli en la neŭŝatela montaro, ni organizas tranoktadon en la hotelo *"La Clef des Champs"* [ŝlosilo al la paŝtejoj] en Tête de Ran, en kiu ekzistas diversaj tranoktebloj de la plej komforta al la plej simpla.

### Veturo el Les Brenets al Tête de Ran

17h50: trajna forveturo el Les Brenets. 18h13: De La Chaux-de-Fonds ekzistas vetureblo busa al Tête de Ran: po Fr 8.- por persono. Infanoj: duonprezo.
Aŭtomobila veturo el Les Brenets: La Chaux-de-Fonds, Vue des Alpes, Tête de Ran.

### Programo en Tête de Ran (Hotelo *La Clef des Champs*

**Sabaton 24-an de aprilo**

**19h00: Vespermanĝo: fr 25.** Buffet de salade, Torrée neuchâteloise, Gratin dauphinois, parfait gracé à l'absinthe. Por la vegetaranoj ovaĵo anstataŭas la viandon. Infanoj: duonprezo.
**20h30-22h00: Amika vespero** kun interkona, kultura kaj luda momentoj.
**22h00: Bonan nokton!**

**Dimanĉon 25-an de aprilo**

**09h00: Matenmanĝo.**

**10h00-12h30:** Grimpado al la supro de Tête de Ran, el kie etendiĝas panoramo al Alparo de Monto Blanka al Säntis kaj norde al La Chaux-de-Fonds kaj al la montaro Vogezoj en Francio (se la veter-dio akceptos, ke ni povu ĝin admiri!)
Promenado en la paŝtejoj invadataj de florantaj jonkviloj. Pluko de bukedoj.
**12h30: Bufeda tagmanĝo ĉe la hotelo. fr 20.** (Infanoj: duonprezo.
**14h00-15h00: Konkluda promenado sur la jonkvil-invaditaj paŝtejoj.**
**15h00: Organizo de la reveturo al La Chaux-de-Fonds kun la aŭtomobilantoj aŭ per la busa veturebo.**

### Tranoktaj kategorioj kun matenmanĝo:

**Kategorio A:** Komforta ĉambro: 1 persono: Fr 90.- 2 personoj Fr 140.-
**Kategorio B:** Ĉambro simplaj (necesejo ekster la ĉambro): 1 persono: Fr 70.- 2 personoj: Fr 110.-
**Kategorio C:** Ĉambro kun 4 litoj kun necesejo kaj duŝo: po Fr 70.- por persono.
**Kategorio D:** Dormejo kun lit-tuko: po Fr 35.- por persono.
**Kategorio E:** Dormejo sen littuko: po Fr 25.- por persono.

# Aliĝo

**Grave: Ĉar la nombro de ĉambroj ne elastas, bonvolu nepre sendi kiel eble plej rapide vian aliĝon, se vi deziras esti inter la akceptitaj partoprenontoj.** Ni devas povi rezervi kun precizo la necesajn tranoktajn lokojn en la hotelo, do indiku kun precizo la deziratan tranoktan kategorion. **Por la pago vi ricevos pagilon al la poŝta ĉekokonto 17-334343-4: *Renkontoj* de *Esperanto-perkoresponde.***

### La aliĝojn oni sendu kiel eble plej rapide. (Utiligu la aldonitan aliĝilon!)

ĉu poŝte al Claude Gacond, strato Chevreuils 14, 2300 La Chaux-de-Fonds,
ĉu rete al gacond@bluewin.ch.
donante la sekvaj indikojn por ĉiu aliĝanto:
Nomoj familia kaj individua
Menuoj viandaj aŭ vegetaranaj
Adresoj poŝta (kaj eble reta)
Telefon-numero.
Elektita tranokta kategorio.

### Pri nia bulteno *SES informas*

Por la estonto mem de nia bulteno estos saĝe disigi la taskon redakcio de la taskoj printado, agrafado, enkovertigo kun la aldonaj dokumentoj kaj dissendado.
Miaj printaj rimedoj per fotokopiado estas primitivaj, kaj tial la fotoj malbone reproduktiĝas, dum per normalaj print-rimedoj ili estus tute konvenaj.

La redaktoro Claude Gacond.

# Tagordo
# de la Ĝenerala Asembleo de SES

1. Komunikoj de la prezidanto.
2. Elekto de voĉnombrantoj.
3. Protokolo de la lastjara kunveno, aperinta en *SES informas* 2003-3 (ne estos laŭtlegata).
4. Jarraporto 2003 (Vidu paĝoj 9-11); Jarkalkulo, bilanco (paĝo 12), raporto de la kaskontrolantoj (laŭtlegota).
5. Buĝeto (paĝo 13), daŭrigo de la jubilea jaro.
6.Elektoj al la estraro: Hans-Werner Grossmann (nova kasisto) kaj Mireille Grosjean (dua vicprezidanto).
7. Diversaĵoj.

# Jarraporto 2003

Se vi legas jarraporton, vi estas aktivulo, funkciulo aŭ historie interesata. Havu plezuron.

Jarraporto estas resumo kaj bilanco pri la agado. Ĉu ni estis agemaj kaj sukcesaj aŭ ne? En la mezo de la agado staris la centjariĝo de nia societo anstataŭ aparta agadplano. Ni ankaŭ neglektis la laborplanon de UEA, sed laboris en tiu kadro. Nia prioritato kiel landa asocio estas la informado.

## Estraro

La estraro interrilatis perrete, kunsidis nur unufoje por aprobi la jarkalkulon, bilancon, buĝeton kaj prepari la jarkunvenon. Neatendite demisiis en aŭgusto la kasistino Elisabeth Lauper, pro diferencaj vidpunktoj. Transprenis tiun oficon bonvole Hans-Werner Grossmann en Muttenz.

## Kunvenoj

La jarkunveno okazis la 5-an de aprilo 2003 en Basel, organizita helpe de la Esperanto-Societo Basel. Partoprenis 30 membroj kaj kelkaj gastoj el Francio kaj Germanio. La estraro estis reelektita kaj Claude Gacond iĝis honora membro merite al lia tutviva senlaca agado por esperanto. La jarkunveno anoncis samtempe la jubileon, per laŭta tamburado, kaj dialoga prelego inter Claude Gacond kaj Andy Künzli pri la kreiĝo de SES.

Tradiciaj estas la ŝatataj studsabatoj en CDELI. Claude Gacond regule regalas nin per perfektigaj kursoj kaj kulturaj aranĝoj. Sabate 24-an de majo 2003 prelegis Ed Borsboom pri la vivo

de Andreo Cseh, vera apostolo de esperanto, kiu kreis la rektan metodon. Ed Borsboom verkis detalan biografion pri Cseh kaj prezentis plej diversajn aspektojn el lia vivo.

Kulmino kaj surprizo estis la vere digna festo pri la centjara jubileo de la fondo de SES, sabate 27-an de septembro 2003 en Lausanne-Ouchy-Rolle. Nekredeble sed vere, pli ol 100 homoj ariĝis, esperantistoj kaj amikoj, en la hotelo Le Château d'Ouchy por la akcepto. Mankis nur la publikaj gastoj. Neforgeseblaj restos la alpa kornisto Rémy Schroeter, la ship-veturo al Rolle dum aŭdiĝis esperantaj kantoj, la plenplena Casino en Rolle, kie ni bankedis. Solene violonĉelis Marion Bélisle-Grosjean, kantis Joëlle Grosjean, Jean-Thierry von Büren kaj Luc Allemand. François Randin filmis la feston kaj produktis filmkasedon. Kun speciala rabato de SES ĝi kostas nur Fr. 18.- anstataŭ Fr. 33.- inkluzive la poŝtajn kostojn. Laŭdon al la reĝisoro de tiu festo: denove Claude Gacond.

SES invitis al informa kunveno la 4-an de novembro en Genève, kie Jo Catil, estro de la esperanto-regiono de Lyon, montris, kiel lia klubo informas kaj varbas. Estis stimula ideo-inter-ŝanĝo. Venis ankaŭ grupo el Lausanne.

# Informado

La interna informado pere de la bulteno *SES informas*, kiu aperis 5-foje, estas varia kaj kompleta. Ni dankas tion al la honorofica redaktoro Claude Gacond. La bulteno estas send-ita varbcele ankaŭ al 200 interesatoj. Cetere SES akiris kaj dissendis la bultenon de JES, tiel ke la membraro estas ankaŭ informata pri la agado de la junularo.

Ankaŭ la ekstera informado funkciis. Mireille Grosjean kompilis kaj dis-sendis denove perpoŝte tri dosierojn en la franca lingvo al redakcioj kaj grav-uloj. Dietrich Weidmann redaktis germanlingve plurajn gazetarajn komunikojn kaj dissendis ilin perrete.

Aperis kelkaj rimarkindaj artikoloj en la gazetaro. Ekzemple en la german-lingva revuo *Der Sprachspiegel* 2/2003, danke al klopodoj de Paul Scherer, longa artikolo *Esperanto - die Sprache der Hoffnung*, verkita de Andy Künzli kaj Bruno Graf. La komunikadcentro en Bruselo dispon-igis modelajn artikolojn rilate al la UK. Tiu kampanjo kondukis al intervjuo de Bruno Graf fare de la *Berner Zeitung*. Same *Le Journal du Jura* renkontis Mireille Grosjean kaj aperigis tutpaĝan artikolon *L'espéranto annihile les frontières.*

Ni eksperimentis tiun jaron al publikaj alpaŝoj danke al la iniciatemo de Mireille Grosjean.

SES prizorgis standon dum la Svisa Socia Forumo en Fribourg 20-21-ajn de septembro 2003.

Nicole Margot, Benno Frauchiger kaj Laurent Burgbacher informis pri esperanto kaj lingva demokratio. Claude Piron prelegis en la universitato. La publika intereso estis

malgranda kaj necesis aktiva strategio por fronti homojn.

Aŭdaca estis la marŝado al Palaco de Nacioj en Genève sabate 6-an de decembro 2003. Mireille Grosjean planis kaj orkestris tiun demonstracion por lingva egaleco. 80 esperantistoj, ankaŭ el eksterlando, manifestaciis kun flagoj kaj sloganoj. Estis signalo antaŭ la malfermo de la UN-konferenco „Ligu la neligitajn“, eble ne sufiĉe priatentita pro festo en la urbo.

Tio estas nur SES-raporto kaj sekve ne ampleksa. Agadis kompreneble ankaŭ la lokaj grupoj, la fakgrupoj de la fervojistoj kaj instruistoj. KCE kiel transnacia centro organizas daŭre altnivelajn monatfinojn.

Bruno Graf, prezidanto

# Donacoj

Donacoj en frankoj al SES: Charlotte Blanc-Maillard, Vevey: 15; Elisabeth Eisenegger, Zürich: 15; Ernst Glättli, Brugg: 15; Mireille Grosjean, Les Brenets: 50; John Hasler, Ostermundingen: 15; Renate Heer, Bern: 10; Marguerite Jayet, Morges: 15; Jeannine Jeanneret, Neuchâtel: 15; Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz: 75; Verena Mallepell, Unterehrendingen: 5; Parzival, Biel: 5; Mady Lynn Reymond, Neuchâtel: 15; Paul Scherer, Emmenbrücke: 5; Henri Wettstein, Versoix: 50. Sume: 305. Patrono 2004: Henri Wettstein.

Donaco en frankoj por la "Agado 2003": Marguerite Jaccard-Besson, Rolle: 50; Gabriele Rozalski: 80. Sume: 130.

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann kaj la redaktoro Claude Gacond dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco kaj antaŭdankas pro la atento, kiun ĉiu alportos al la pagilo aldonita al la nuna bulteno.

# Kotizoj 2004

La kotiz-alvokilo aldonita al la januara numero 2004-1 de nia bulteno *SES informas* bedaŭrinde erare kredigis, ke temis pri la kotizado por la jaro 2003. Pretigante la koncernan informilon, mi forgesis ŝanĝi la koncernan jarindikon, kaj esperas, ke ĉiu tamen komprenis, ke reale temis pri kotizado al la jaro 2004.

Por tiuj, kiuj tial ne kotizis, **jen ripete la kotiz-indikoj:**

kun membreco:
Fr. 10.- ĝis 18 jaroj
Fr. 20.- 19-29 jaroj.
Fr. 35.- ekde 30 jaroj.
Fr. 50.- geedzoj
Fr. 700.- dumviva membro.

Por fariĝi patrono: duobla baza kotizo.

Pardonpete via Claude Gacond.

| SES-Librotenado 2003 | 1.1.2003 | 31.12.2003 |
|---|---|---|
| **AKTIVOJ** | | |
| Poŝtkonto | 589.55 | 796.47 |
| Kaso | 7.70 | |
| Kuranta ŝparkonto CS-ZH -40 | 11'001.50 | 11'358.65 |
| WIR banko | 33'707.75 | 12'348.25 |
| Kasobligacioj CS-ZH | 15'000.00 | 15'000.00 |
| Prunto al KCE | 15'000.00 | 15'000.00 |
| UEA konto sesa-v (Saldo: 214.25 je kurzo 1.56) | -25.10 | 334.23 |
| Inventaro | 1.00 | 1.00 |
| Bonhavo ĉe ESTV: Antaŭimpoŝto | 315.55 | 1'884.45 |
| Transaj aktivoj | 79.00 | 120.00 |
| **Sumo** | **75'676.95** | **56'843.05** |
| | | |
| **PASIVOJ** | | |
| Transaj pasivoj | | 685.00 |
| | | |
| Kapitalo | | |
| Stato je la 1.1.2003 | 55'002.50 | |
| Malgajno (Plielspezoj dum 2003) -2'519.25 | | |
| Stato je la 31.12.2003 | | 52'483.25 |
| | | |
| CDELI - Claude Gacond | 6'256.65 | |
| | | |
| Fonduso "Agado 2003" | | |
| Stato je la 1.1.2003 | 14'417.80 | |
| Ricevitaj donacoj 2'257.00 | | |
| Faritaj elpagoj -13'000.00 | | |
| Stato je la 31.12.2003 | | 3'674.80 |
| **Sumo** | **75'676.95** | **56'843.05** |



**Bruno Graf vizitanta la ekspozicion en "Magasin du Monde"** (Fotis Stefano Keller)

| Jarkalkulo | 2003 | Budĝeto 2003 | Budĝeto 2004 |
|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | |
| Informado, varbado | 4'675.75 | 4’295.00 | 5’000.00 |
| Omaĝoj, laborrimedoj | 86.00 | 100.00 | 100.00 |
| Subvencioj, premioj, projektoj | 1'079.28 | 1’000.00 | 1'000.00 |
| SES informas elspezoj | 2'424.70 | 2’000.00 | 2'500.00 |
| Kunvenoj kaj kunsidoj (GK, estrara, regionaj) | 488.00 | 700.00 | 600.00 |
| Abono al revuoj | 129.00 | 150.00 | 150.00 |
| UEA Kotizo | 128.67 | 130.00 | 150.00 |
| Administraj kostoj (afrankado, telefonkoj, ktp) | 549.80 | 500.00 | 500.00 |
| Bank- kaj poŝtspezoj | 298.70 | 200.00 | 300.00 |
| Donaco al KCE | 450.00 | 450.00 | 450.00 |
| Redaktado perkoresponda kurso germanlingve | 2'500.00 | 5’000.00 | 2’500.00 |
| Diversaĵoj | 425.55 | 200.00 | 300.00 |
| **Sumo** | **13'235.45** | **14’’725.00** | **13'550.00** |
| | | | |
| **Enspezoj** | | | |
| Membrokotizoj | 4'377.00 | 4’000.00 | 4’300.00 |
| Abono al SESi sen membreco | 500.00 | 400.00 | 500.00 |
| Donacoj, heredaĵoj | 2'356.00 | 2’500.00 | 3'000.00 |
| SES informas enspezoj | 375.00 | 375.00 | 375.00 |
| Bank- kaj poŝtinterezoj | 3'073.20 | 2’000.00 | 1’260.00 |
| Diversaĵoj | 35.00 | | |
| **Sumo** | **10'716.20** | **9’775.00** | **9’375.00** |
| | | | |
| **Malgajno** (Plielspezoj dum 2003) | **2'519.25** | | |

La kasisto: Hans-Werner Grossmann, la 15-an de februaro 2004



**Prezidanto Bruno Graf malfermanta la renkonton de Vevey** (Fotis Randin)

# Tre sukcesa estis la dua jubilea renkonto en Vevey la sabaton 7-an de februaro




(Foto de François Randin)

**En la memoro de ĝiaj 50 partoprenintoj, tiu tago restos kiel tre signifa kaj entuziasmiga. Vivoplene raportis Andy Künzli pri nia plur-skola planlingva aventuro kaj konklude digne inaŭguriĝis eta migrema esperanto-ekspozicio en magazena galerio sekve al la iniciato de Charlotte Blanc-Maillard.**




**Andy Künzli preleganta pri la planlingva historio (Foto Randin)**

# FACETOJ EL LA PLANLINGVA HISTORIO DE SVISLANDO
## (resumo de la prelego en Vevey)
## Kelkaj konkludoj

**De Andy Künzli**

Mi tre esperas, ke por la partoprenantoj de la SES-tago la 7-an de februaro en Vevey, mia prelego estis interesa kaj utila. Koran dankon, ke oni venis tiom multnombre. Pro la bunteco kaj vasteco de la temaro kaj la kurteco de la tempo eblis ĉerpi sole kelkajn facetojn, precipe montri ilustraĵojn, kelkajn inter ili premiere, kaj aldoni mallongan komenton. En ĉi tiu sekva kontribuo, nova parto de serio ĝis la apero de la enciklopedio, mi provas resumi miajn ĉefajn eldirojn kaj prezentaĵojn kaj kompletigi ilin per klarigoj, kiuj dum la prelego estis eble tro nekompletaj. Ankaŭ ĉi tiu resumo neniel pretendas esti kompleta.



**Bruno Graf, Claude kaj Nicole Piron kaj aliaj interesatoj** (Foto Keller)

## 1. La planlingva movado kiel tuto multfaceta kaj heterogena

a) Ni trovas en la planlingva movado la vivantan aplikon de pluraj lingvoprojektoj kun internacia signifo. Elstaran rolon en Svislando ludis precipe Volapük (prezentita en 1879), Esperanto (1887), Ido (1907), Occidental-Interlingue (1922/1949) kaj Interlingua (IALA 1951).

Krom ĉi tiuj ĉefaj planlingvoj, en Svislando estis publikigitaj ankaŭ la fundamento de kelkaj efemeraj projektoj kiel Langage humain (Umano 1900), Tersboca (Rotter 1912), Parlamento (Perrier/Ferry 1918, Espido (Pesch 1923), Espo (Stojan 1926), Ablemonde (Schwarz 1932), Fitusa (Rosenblum 1935), Soma (Rosenblum 1938), Neolatino (Schild 1947) kaj aliaj. Oni ne forgesu la sennombrajn kaj verŝajne vanajn reformproponojn de René de Saussure (detale pri li en proksima *SES informas*).

Ĉi-kuntekste, diversaj gramatikaj detaloj (kiel ekzemple ig/iĝ, ant/int, far, ktp) provokis unuopulojn ĉiam denove por kvereli, eĉ publike.

b) La diversaj planlingvoj disvastiĝis varie laŭ regionoj:

Dum Volapük trovis la plimulton de siaj adeptoj en germanlingva orienta



**Prepare al la tagmanĝo** (Fotis Randin)

Svislando (precipe SG, AR, TG, ZH, AG, LU, BE, BS), la Esperanto-(Eo)-movado ekprosperis en la romanda parto (GE, VD, NE) kaj iom post iom atingis ankaŭ Alemanion. Kiel konate SES fondiĝis en 1903 en Rolle/VD.

Kvankam Ido estas afero de francaj reformemuloj, en Svislando Ido estis enkondukita fare de alemanoj (Schneeberger BE, Nötzli ZH, Waltisbühl ZH, Feierabend BE, Schrag BE, Cornioley BE, Matejka SG, Kostezer SG, Anderegg TG, Wenk BS, Mario Schmid ZH/SZ, Dürst ZH, Nidecker BS, Kreis ZH/GE, Haas ZH, Hamburger SG, Bosshard ZH, ktp, supozeble grandparte protestantoj). Kelkaj socialistoj (ZH) kaj katolikoj (LU) transiris al Ido. Restus esplorinda la demando, ĝis kiu grado la idistoj estis (kaŝitaj) adeptoj de la zamenhofa esperantismo-homaranismo (interna ideo).

La kolektiva transiro al la movado Occidental-Interlingue en 1928 estis preparita de romandaj idistoj (Creux FR, Berger VD, Lagnel VD, Mayor VD, Aschwanden, Denzler kaj aliaj en Biel-Bienne). Pri Interlingua, kiu fontis en eksplicite akademiece-lingvistikaj diskutoj (IALA), okupiĝis homoj, kiuj estis konvinkitaj, ke per Interlingua kiel kulmino en la naturalisma skolo en planlingvoj estis trovita

***la*** matura propono de la neolatina aŭ neolatinida movado, ĉefe por apliko en scienco kaj fone de la movado por kuniĝanta Eŭropo.

Kompare kun Occidental kaj Interlingua, kiuj estis preskaŭ pure lingvistikaj movadoj, la sola "popola" movado do restis la Eo-movado, iom-ete la idista movado, kiu ankaŭ inter-nacie ŝajne baldaŭ venos al sia fino. Pro la fakto, ke la Eo-movado portas en si la tiel nomatan internan ideon, kiun la aliaj planlingvaj movadoj ne aŭ apenaŭ konas, kaj ĉar entute Eo devas esti konsiderata kiel la plej sukcesa planlingva sistemo, rezultiĝis la venko de Eo super ĉiuj ĝis nun ekzistantaj planlingvoj. Ŝajnas al mi, ke krom la esperantistaro ankaŭ adeptoj de aliaj planlingvoj hodiaŭ ĝenerale agnoskas tiun nekontesteblan fakton.



**Nia pianisto Jean-Thierry Randin** (Foto Randin)

Demografie, en preskaŭ ĉiuj pli dense loĝataj regionoj kaj kantonoj vivis kaj vivas adeptoj de Eo, kompare fortaj ĉeloj ĉiam ekzistis kaj daŭre ekzistas en la urboj Ĝenevo, Laŭzano, Neuchâtel, La Chaux-de-Fonds, Bazelo, Zuriko, Lucerno, Berno (tiel laŭ PIV 2 oni skribas tiujn nomojn en Eo). La Eo-grupoj formiĝis unuavice en urboj, dum en la kamparo ekzistas ĉefe unuopuloj. Preskaŭ mankas plan-lingvaj movadetoj respektive anoj en

konservativaj kaj iom izolitaj regionoj (NW, OW, UR, SZ, GL, AI, VS, FR, JU, BL, GR, TG). Pli frue ekzistis Eo-grupoj ankaŭ en malpli grandaj urboj kiel Morges, Vevey, Thun, Bellinzona, Locarno, Chur, Herisau, kaj aliaj.

Kiel asertas kelkaj aŭtoroj, la Eo-movado similas al partio aŭ prem-grupo kaj ne al "popolo". Laŭ Carlevaro ni eble troviĝas hodiaŭ en la situacio kiel kultura-etika movado, kun propra lingvo. Laŭ mi Eo funkcias hodiaŭ same bone kiel ajna etna lingvo (eĉ pli bone, ĉar multaj etnolingvoj disponas pri subevoluinta parol- kaj skribkulturo).


c) El socidemografia vidpunkto, la adeptaro de la planlingvoj formiĝas el plej diversaj *profesioj* (multaj instru-istoj, fervojistoj, kelkaj kuracistoj, malpli da komercistoj kaj laboristoj), *tavoloj* (precipe mezklasuloj kaj homoj kleraj kun pli alta eduko kaj kun kulturaj interesoj), *sekso* (viroj kaj virinoj estas pli malpli ekvilibre re-prezentataj, ekzistas pluraj esperant-istaj geedzoj kaj familioj). Kiel ĉi-koncerna studo de nia esperantologo Tazio Carlevaro (1996) povis montri, Eon oni lernas kutime antaŭ sia 40-a jaraĝo (aŭ en sia pensia aĝo). La Eo-komunumon tendence konsistigas homoj eks-junaj. Aktivado ofte okazas en la loka grupo, kie oni establas rilatojn profundajn kaj daŭrajn. Carlevaro (kaj aliaj) uzas la nocion diasporo por difini la karakteron de la Eo-komunumo.

Interesa estas la malpli konata fakto, ke minimume dudeko da adeptoj en Svislando estis tiel nomataj 'multi'-planlingvanoj, ĉar ili agadis sinsekve por diversaj planlingvoj (kiel ekz. Schneeberger por Volapük, Eo kaj Ido; kiel Berger por Ido, Occidental kaj Interlingua; kiel Schild por Ido, Occidental, Neo-Latino kaj Interlingua, ktp). En sia sen-kompromisa klopodo defendi sian laŭ-dire pli superan lingvosistemon, adeptoj de tiu kategorio ofte kondutis sufiĉe polemike kaj iom agreseme, precipe al kolegoj, kiuj adeptas ĉe aliaj planlingvoj (kiel Schrag, Cornioley, Berger, Matejka, Fischer kaj aliaj).

ĉ) El tiu bunteco montrita sub c) evidentas, ke ekestis pluraj fakaj organizoj: ekz. *instruistoj* (EES, KCE, ILEI-sekcio), *fervojistoj* (SAEF iam estis tre forta); *religiemuloj* (kristanoj kun KELI- kaj IKUE-sekcioj, baha-anoj), *blinduloj*, kaj aliaj.

d) Malgraŭ tiu iom konfuza kaj multfaceta bildo, oni povas observi, ke la diversaj planlingvaj movadoj ĝuis mirindan stabilecon dum jardekoj kaj iliaj adeptoj estas karakterizataj de forta lojaleco al sia propra planlingvo, en la momento kiam ili apogas ĝin. Tio validas ankaŭ por Svisa Eo-Societo, fondita en 1903, kiu en sia tuta historio ĝis hodiaŭ, malgraŭ krizoj kaj malgraŭ malfaciloj, ekzemple trovi prezidanton, pluekzistas seninterrompe ĝis la hodiaŭa tago. La pli malgrandaj planlingvoj malaperis de la scenejo, kiam elĉerpiĝis iliaj membroj aŭ mortis iliaj protagonistoj. Kelkaj sam-ideanoj restis lojalaj al sia movado eĉ

dum multaj *jardekoj*. Restas la demando, ĉu Esperanton iam trafos la sama sorto kiel en la kazo de Ido, Occidental kaj aliaj, se ne baldaŭ okazos sufiĉa refreŝiĝo en la Eo-komunumo (oni komparu la studon *Ĉu Eo postvivos la jaron 2045* de Tazio Carlevaro, Bellinzona 1/1999, 2/2000).




**Andy Künzli raportanta pri la enciklopedia projekto** (Foto Keller)

## 2. Internacieco

Svislando ludis gravan rolon kiel centro, iusence kiel "eldorado" de pluraj internaciaj planlingvaj movadoj. Svislando longe estis la centro de la internacia:
- Volapük-movado, kiu situis en la urbo Konstanco, en la tuja najbareco de Svislando, kaj radiis en Svislandon, precipe orientan (SG, ZH);
- Eo-movado (UEA en Ĝenevo, revuo *Esperanto*);
- Ido-movado (kun Schneeberger en Lüsslingen, Noetzli en Zuriko, Kreis en Ĝenevo, periodaĵo *Progreso*);
- Occidental / Interlingue-movado (Berger, Lagnel, Matekja; periodaĵo *Cosmoglotta*);
- Interlingua-movado (Berger, Fischer, Bakony-Fundation, Castellina; kun la

periodaĵo *Currero International* kaj la organizo UMI).

En Svislando okazis pluraj internaciaj kongresoj de la reprezentantoj de ĉiuj tiuj movadoj, inter alie la Universala Kongreso de Eo (sesfoje inter 1906 kaj 1979).

# 3. Instituciigo

a) Estis multaj provoj kaj klopodoj, ke la planlingva movado instituciiĝu. En la kazo de Eo oni povas rekonsciigi pri la klopodoj dum la 1920-aj jaroj kadre de Ligo de Nacioj atingi la statuson kiel lingvon en internaciaj organizaĵoj kaj en la lernejoj (Privat, Bovet, kaj aliaj). La celaro kaj agado de CDELI, KCE/IFA eble estis la kulmino de tiuj strebadoj entreprenitaj sub la esenca motorado de individuo (instruisto Claude Gacond), kiu dediĉis sian vivon al Eo kaj al la studo de planlingvoj. Ĝis kiu grado tiuj klopodoj estis longdaŭre sukcesaj aŭ duonsukcesaj aŭ nur epizodecaj – tio estas alia demando. Ĉi tie ni ne forgesu ankaŭ la gravan kontribuon de Svisa Radio Internacia, kiu dum preskaŭ 50 jaroj disaŭdigis radioprelegojn en Eo (1946-1992).

b) Lige kun tio en la agado progresigi Eo-n aŭ aliajn planlingvojn kiel publike kaj ŝtate agnoskitajn planlingvojn, oni observis ankaŭ grandan porcion da diletanteco de individuaj propagandistoj, kiuj laboris honorofice kaj estis ekster ĉia kvalita kontrolo. Fakte, ne eblas malpermesi la agadon de individuoj, kiuj ekzemple ne plaĉas al la "oficiala SES".


c) Ĉar en Svislando la lingvopolitiko kaj decid-strukturo rilate lernejajn aferojn estas ĉe la unuopaj kantonoj, la klopodoj proponi planlingvon kiel oficialan instrufakon devis/as esti entreprenataj sur kantona nivelo. Tio montriĝis nefacila afero. Principe la kantonoj jam estis/as okupitaj per siaj propraj lingvodemandoj (franca lingvo en Alemanio, germana lingvo en Romandio). Kiel federacio kun 4 oficiale agnoskitaj lingvoj, Svislando do havas sufiĉe da ŝarĝo kaj respondeco subteni ĉiujn tiujn lingvajn minoritatojn kaj supozeble ne havas la okazon / deziron favori ankoraŭ iun planlingvon, des pli ĉar la retoromanĉoj konstante sentas sin neglektataj kaj ĉar lastatempe ankaŭ la diskuto pri la ĝenerala enkonduko de la angla lingvo akriĝis. Oni povas sin demandi, kiam la centmiloj da albanoj, eksaj jugoslavianoj (serboj kaj kroatoj), turkoj aŭ tamuloj, kiuj vivas en Svislando, postulos la enkondukon de siaj idiomoj en la politikon, kiam ili posedos la rajton voĉdoni kaj esti elektitaj. Tio laŭ mi neniel estas utopia en la estonteco. Ĉu tiam Eo ricevos novan konkurencon?

# 4. Apogo, agnosko

a) Kelkaj signifaj personecoj de la publika vivo (el la unuavice neesperanta medio) kiel ĝiaj advokatoj apogis Eon, ĉu morale, ĉu finance: ekz. Ernest Naville (filozofo), Pierre Bovet (pedagogo, ankaŭ lia filo Daniel), Auguste Forel (psikiatro), Charles Baudouin (psikologo), Emil Frey (politikisto), Arnold Bohren

(politikisto), Eugène Failletaz (komercisto), Jacques Mühlethaler, Pierre Cérésole, Edouard Claparède, Marc Rohrbach (pacaktivuloj), Marguerite Bosserdet (pedagogino), Freinet-metodo, kaj aliaj. En la komenca tempo, ne malmultaj aliaj, malpli konataj eminentuloj (sur loka nivelo) ludis la rolon kiel patronoj de Eo-societoj aŭ mem fariĝis aktivaj esperantistoj (ekz. Hermann Stroele, Edouard Ducommun, Jean Wenger, kaj aliaj). Oni ne forgesu ankaŭ la vicon de svisaj lingvistoj, kiuj interesiĝis pri la planlingva demando: kiel Ferdinand de Saussure, Eduard Schwyzer, Eduard Debrunner, Otto Funke, kaj aliaj. Fakte nur Gonzague de Reynold, dekstrema reakciulo el Friburgo, kadre de Ligo de Nacioj publike malrekomendis Eo-n, kiun li malamis kaj nomis "barbara". Tiu epizodo verŝajne ankoraŭ longe damaĝis al la afero de Eo kaj de la internacilingva demando entute, almenaŭ ĝis la Montevidea Rezolucio en 1954 fare de Unesko.

Al tiu kategorio de agnosko apartenas, laŭ la opinio de Carlevaro, la personoj, kiuj partoprenas la vivon de la movado, apoge al la Eo-idearo (aŭ -idealoj), sed kiuj ne bone konas la lingvon. Ili konsideras sin esperantistoj kaj estas supozeble ankaŭ konsiderataj kiel tiaj fare de la ceteraj "veraj" esperantistoj. Laŭ Carlevaro indus do trovi solvojn por ilin plej utile integri en la movadon.



**Nia fotisto François Randin** (Fotis Keller)

Edmond Privat estis la spirita daŭriganto de Naville, Forel kaj Bovet kaj konkrete adoptis kaj daŭrigis ilian filozofion en ĵurnalismo, politiko kaj en la internaciaj organizoj. Pri li kaj la "tragika kvaropo" Hodler, de Saussure, Jakob kaj Stettler mi provos raporti en proksima *SES-informas.*

b) Kiel konate, la *ekstera publiko*, kiu ne havis/as spertojn kun Eo aŭ alia planlingvo, malfacile imagas pri kio

temas. Ĉar la antaŭjuĝoj estas tro grandaj, sekve aperas skeptiko kaj kontraŭstaro. Ĉi tiu ekstera publiko do ne hezitas nomi la esperantistojn utopiistoj, stranguloj, sektemuloj, frenezuloj kaj simile. (Claude Piron brile priskribis la psikologiajn barojn de homoj, kiuj ne konas – kaj rifuzas - Eon). Flanke de la *gazetaro* oni devus ankoraŭ pli profunde analizi, ĉu ĝi estis ĉu plimulte pozitiva, negativa aŭ indiferenta rilate la planlingvan movadon. El la pasinteco ni scias, ke kelkaj gazetoj tre laŭdis la aferon de Eo, aliaj disvastigis mensogojn, tiel ke oni devis interveni eĉ per minaco de tribunala plendo, aliaj simple raportis neŭtrale. Laŭ la libro de Isaj Dratwer (1977) ni scias, ke mondskale multaj *sciencistoj* esprimis sin favore rilate la demandon de internacia planlingvo (Einstein, Mangold, Piccard kaj aliaj). En Svislando mem oni povus deziri iom pli fortan interesiĝon flanke de lingvistoj rilate al planlingvoj aŭ al Eo konkrete. Bedaŭrinde, en Svislando mankas universitataj katedroj pri interlingvistiko – kaj supozeble ankaŭ estonte mankos (sole la slavisto Patrick Sériot en Lausanne iom okupiĝis prie). Tamen pluraj sciencaj verkaĵoj kun universitata aprobo povis esti verkitaj (ekz. Weidmann, Künzli, Farrokh, Papaloïzos).

## 5. Originaluloj kaj alternativaĵoj

En la historio de la planlingva kaj precipe Eo-movado aperis, krom diversaj individuoj-originaluloj, ankaŭ iuj propagandaj strategioj, aplikataj de grupiĝoj, kiuj diverĝas de la strategioj de la "tradicia" (aŭ "oficiala") movado kaj kiuj de siaj kontraŭantoj aŭ de neŭtralaj opiniantoj estis klasifikitaj kiel alternativaj strategioj, en iuj kazoj eĉ kun tendencoj strukture *sektemecaj* (sektemo en la senco: la koncerna sektema komunum-ero, dissplitiĝinta de la ĝenerala aŭ tradicia komunumo a) disvastigas opoziciajn, dubindajn instruojn, b) mem supertaksas sin, respektive sian gravecon, opiniante, ke oni estas io pli supera, ol la resto).

Kiel ekzemploj en tiu kategorio de varbagado eblas nomi la *geonismon* de William Perrenoud, la fenomenon *"Reĝo" Parzival'* kaj la *Esperantan Civiton.* Kvankam tiuj tri kazoj diferenciĝas unu de la aliaj, ili havas ankaŭ komunajn trajtojn, ekzemple ke ili celas laŭdire nur la plej bonon por la afero (do Eo) mem, sed per rimedoj evidente strangaj, idealismaj, nekonvenciaj, abstraktaj, fanatikaj, tro nematuraj, ktp, tiel ke oni povas aŭ devus konsideri ilian efikon kontraŭproduktiva, eĉ damaĝa al la "serioza" Eo-propagando.

La *geonismo* estis en si mem interesa pens- kaj ag-koncepto propagandata ekde 1955 de la neŭŝatelano William Perrenoud (1898-1984) surbaze de la *Fundamento de Geonismo*. Per sia projekto Perrenoud celis la "konscian kreadon de tuteca homa kulturo kaj, kadre de tio, la disvastigon de la praktika aplikado de Eo, ĝuste en periodo de la akceliĝanta unuiĝo tutmonda". La dramo de la manifesto de Perrenoud estis, ke ĝiaj

postuloj estis tro abstraktaj, tro idealismaj kaj profet-tonaj. Kvankam ĝi celis disradii optimismon inter la e-istoj, ĝi postulis tutecan komprenon ne ĉiam trovitan inter ili. Sekve, geonismo kaŭzis malkomprenon ĉe multaj neintelektaj samideanoj kaj restis entute nematura afero, nelaste pro la malsaniĝo kaj izoliĝo de ĝia aŭtoro, kiu mem elpaŝis iom fanatike kun siaj instruoj.

En la libreto *Schweizer Originale* de Hans A. Jenny, Nebelspalter-eldonejo (3/1992), la pacaktivulo “Reĝo Parzival"” (vera nomo Serge Reverdin) en Biel-Bienne estas agnoskita kiel *originalulo*. La dramo de Reverdin, kiu devenas de familio de signifaj ĝenevaj personecoj, estis, ke lige kun sia kontestata pacaktivado en la svisa armeo, li frontis gravajn problemojn kun la psikiatrio. Sekve, en la prizono, kien li estis portita laŭ propra eldiro maljuste, kaj en revelacio, Reverdin adoptis la nomon “Reĝo Parzival”. Poste, kiel “arkonida kapitano Bonan Tagon”, kiel 'La sperma trono de la Unika Dio', ktp, li lanĉis vastan, iom sensacian Eo-varbagadon, skribante leterojn al gravaj reprezentantoj de UN, al svisaj kaj alilandaj politikistoj, kiuj entenis petojn, invitojn kaj alvokojn lerni Eon. Kompreneble tio ne povis okazi kun la ĝojo de la “seriozaj” Eo-propagandistoj. En la Eo-movado ekzistis ankaŭ aliaj specoj de “originaluloj” (kiel ekz. Lorenz en Lucerno aŭ Droz en Zuriko), kiuj tamen publike limigis sian varbagadon kaj okupiĝis pli malpli nur pri si mem. Eĉ la fama humanisto Auguste Forel en sia vivotempo estis konsiderata de iuj konservemuloj kiel iom freneza avangardemulo. Ankaŭ René de Saussure, kiam li komencis agadi kiel eterna lingvo-reformemulo, devis esti konsiderata de ne malmultaj kiel fanatika strangulo kaj renegato (eĉ kiel malamiko de Eo). Kaj tutcerte ĉiu aktiva esperantisto almenaŭ unufoje en sia vivo devis digesti mokaĉon de siaj samtempanoj, kiuj nomis lin aŭ ŝin ekzotul(in)o aŭ simile.

La *Esperanta Civito* elkristaliĝis kiel alternativa koncepto pri la povostrukturo de la Eo-movado fine de la 1990-aj jaroj, komence de la 21-a jarcento, en konsekvenco de la tiel nomata 'raŭmismo' kaj reage al la fortiĝanta krizo de UEA respektive de la 'tradicia' Eo-movado 'finvenkisma'. Iuj flanke de la Esperanta Civito vidis en ĝi opcion sekurigi la pluekziston de la Eo-komunumo kiel subjekto de la internacia juro (Silfer, Żelazny); ĝiaj kritikantoj primokis ĝin, ĉar ĝi celus establi pseŭdoŝtatajn strukturojn (Eo kiel ŝtato aŭ almenaŭ kiel politika partio). En *SES informas* 2/2000 oni povis legi, ke la realigeblo de la Esperanta Civito estas pridubinda, la projekto mem nomata “interesa intelekta fikcio, sed fakte nur vizio, aŭ utopio.” En *SES informas* 5/2003, SES-prezidanto Bruno Graf konfirmis sian impreson, ke "la Esperanta Civito estas por multaj stranga fenomeno. La organizo aspektas kiel ombra kabineto, kun trajto fundamentista, ja sekteca." Ŝajnas, ke la povostrukturo de la Esperanta Civito estas, spite al sia mempretendo je demokratieco, en

si mem, kaj pro sia hierarkia strukturo, fremda al la demokratia federisma spirito de la svisoj kaj tial ĝenerale ne povis trovi aprobon.

Ĉar en jura ŝtato kiel Svislando ekzistas la plureco de opinioj, kiel neregistara organizaĵo evidente oni povas nenion aŭ tre malmulton entrepreni kontraŭ tiuj tendencoj, ankaŭ ne malpermesi ilin. Konfliktoj kun la juro okazas, kiam tiuj grupiĝoj aŭ personoj malrespektas la leĝojn de la lando aŭ sian propran statuton. Ĉiukaze antaŭprogramitaj estas konfliktoj inter anoj de tiuj tendencoj kaj anoj de la "tradicia" movado, kiuj konsideras sin normalaj kaj la alian nenormalaj.

Sed ĉi tie ni troviĝas jam en psikologio, kiu ne estas mia kampo. Supozeble ankaŭ aliaj kulturaj movadoj frontas tiajn problemojn, do ni supozeble ne devas supertaksi aŭ timi tiujn efemerajn ekzistaĵojn.

Pri tiuj kaj multaj aliaj prilaborataj temoj eblos legi en la Svisa Planlingva Enciklopedio, kiu espereble povos baldaŭ aperi. Sen ke en tiu prezento ni tuŝis la plej foran kaj plej lastan detalon de kelkaj (provizoraj) konkludoj el la enciklopedia laboro, oni povas starigi al si la jenajn demandojn: Ĉu la planlingva movado estas do la historio de sukceso aŭ de fiasko, ĉu ĝi estas afero de stranguloj kaj utopiemuloj aŭ de homoj raciaj kaj pacamaj kun la volo plibonigi la mondon kaj primokataj de la ceteraj samtempanoj? Ĉiukaze, la planlingva movado estas interesa fenomeno de la idea historio kaj pro tio meritus pli da atento flanke de la publiko. Kun tiu intenco kaj en tiu senco la enciklopedio estis lanĉita. Reagoj estas bonvenaj.

En venonta eldono de *SES informas* mi volonte daŭrigos raporti pri mia prelego de Vevey kaj antaŭdankas pro via intereso.

Andy Künzli.

-oOo-

## Fuŝaĵo

Pasintnumere la lastan intervjuon pri Ivo Lapenna fuŝis malapero de parto de la teksto. Tion ĉi ni riparos per la republikigo de la intervjuo en la venonta numero de *SES informas* kun aldone kelkaj akompanaj dokumentoj.




**Post la prelego de Andy Künzli la renkonto konkludiĝis per vizito de esperanto-ekspozicio muntita en la galerio de "Magasin du Monde"**



**Claude Gacond donas klarigojn pri la ekspoziciaĵoj al publiko pozitive impresata pri la kvalito de la ekspozicio titolita**
*"L'espéranto, une langue bien vivante"*

# Tutsvisa aktiveco

# CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
Tel.: 032 967 68 55.
Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.
Retadresoj: CDELI.VCH@ne.ch
martine.schneller@ne.ch
claude.gacond@ne.ch
nancy.fontannaz@ne.ch

## Venontaj Studsabatoj

Sub la gvido de Claude Gacond, Monika Molnar kaj Stefano Keller studsabatoj okazantaj preskaŭ ĉiumonate ĉe CDELI alportas utilan helpon al la lernantoj kaj instruantoj de esperanto. Tial ilia frekventado konsilindas al ĉiuj studemuloj. Kiu volas progresi en la praktiko de esperanto, tiu rezervu la sekvajn sabatojn: **marte 20, maje 15, junie 19 kaj novembre 20.** Por minimuma kovro de la elspezoj estas petata partoprenkotizo de Fr. 10.- por partopreno.

**Averto: Ziko Markus Sikosek ne povos ĉeesti je la 20-a de marto pro grava familia kaŭzo. Tre verŝajne li prelegos en septembro en dato anoncota.**

### Horaro

**9h30: Malfermo de la CDELI-salono:** kun eblo aĉeti brokantajn librojn je la favorega prezo de po Fr. 5.- por libro beletra kaj po 3.- por la aliaj. Novaj libroj ankaŭ aĉeteblas.

**11h00: Oficiala malfermo** kaj formiĝo de la stud-grupoj.
11h45: Kafuma paŭzo.
**12h00: 2-a stud-periodo.**
12h45: Komuna tagmanĝo en la restoracio Ital'Panini, Serre 25.
**14h30: 3-a stud-periodo.**
15h15: Teuma paŭzo.
**15h30: 4-a stud-periodo.**
**16h15: Konkludo de la renkonto** en la CDELI-salono, kie eblas resti por teumi, babili, akiri librojn ĝis la propra forirmomento.
**17h30: Oficiala fermo.**

### Enirejo al la CDELI salono

3-a pordo nord-orienta de la biblioteka domo.

**Por atingi la bibliotekon**

**El la stacidomo:** La biblioteko situas ĉe la strato Progrès Numero 33. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buslinio 4, direkto "Hôpital". Bileto akireblas en la buso mem. Petu la haltejon "Bibliothèque".

**Aŭtomobile:** Ekde la urba enirejo videblas indikiloj konduke al la biblioteko.

### Aliĝo

**Por faciligi la organizon de la aranĝo la partoprenontoj bonvolu anonci sian aliĝon al**
**Claude Gacond, Esperanto, CP 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds 5.**
**Rete: gacond@bluewin.ch**
**Tel: 032 926 52 32 aŭ 032 967 68 55.**

-oOo-

junularo esperanta svislanda

**junularo esperanta svislanda**
jeunesse espérantophone suisse
junges esperantio schweiz
gioventù esperantista svizzera
giuventetgna esperantista svizra

Postfach 3324, 4002 Basel
Telefon-numero: 061 301 2705
info@jesperanto.ch
www.jesperanto.ch
Prezidanto: Laurent Burgbacher
Sekretario: Joëlle Grosjean

## Belaj tagoj en Kanderŝteg

La ĉi-jara SViS (Svisa Vintra Semajnfino) de JES komenciĝis vendredon la 13-an de februaro je la 13h13, kiam renkontiĝis kelkaj (nu...) junaj esperantuloj en la stacidomo de Frutigen. Ni bone travivis tiun superstiĉan momenton antaŭ ĝui impresan viziton en la konstruejo de la nova Lötschberg-tunelo [Leĉberg].

La plej junaj esperantaj tunel-vizit-intoj daŭrigis sian vojon al Kander-ŝteg, kie atendis la SViSa domo (la ĉaledo "Schweizerhaus") por gastigi nin dum du pliaj tagoj. Dumvespere iom post iom la juna esperantularo pli-grandiĝis.

Tamen multaj spagetoj restis manĝ-endaj por la kvinopo, kiu sabate luis promenskiojn por skipromeni tra la Kanderŝtega valo.

Alia kvaropo decidis ekskursi al la alia flanko de la malnova Leĉberg-tunelo por skiadi en Lauchernalp [Laŭĥernalp].



**La tunel-vizitontoj. En la centro de la grupo Benno Frauchiger.** (Fotis Andrée Gacond)

Vespere ni denove kuniĝis por SViSa fonduo kaj luda vespero. Tamen, post la sporta tago ni tro lacis, tiel ke jam frue ĉiuj enlitiĝis, kaj nur malfrue ellitiĝis la dimanĉan matenon. Post nova tago sledada kaj skiada, 9 junaj esperantuloj kontente hejmen-vojaĝis.

Benno Frauchiger [Fraŭĥiger].

# Kurssemajnfino

**15-16-ajn de majo.**

Por kreskigi nian JES-membraron, ni konstatis, ke nepre necesas organizi kurssemajnfinon por junuloj. Ni klopodos allogi junulojn el ĉiuj lingvaj regionoj de Svislando.

Benno Frauchiger.

# KCE


Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds.
Tel. kaj fakso: (032) 926 74 07.
kce.esperanto@bluewin.ch


# Programo

Sen alia indiko la menciita aranĝo okazos ĉe KCE mem.

**Marte 27**: Ordinara Asembleo de Kooperativo de Literatura Foiro (ne publika).
**27-28:** Kultura semajnfino kun d-ro Giorgio Silfer: Eŭropa Unio sojle al la nova Konstitucia Traktato.
**Aprile 8-12:** Plurnivela internacia kursaro: komencantoj, progresantoj, esperanto-metodiko.
**Maje 22-23**: Kultura semajnfino pri Ruslando kun Anatolo Gonĉarov.
**Julie 05-10:** Naturamika semajno en Grindelwald kun Francisko Degoul.
**13-18:** Plurnivela internacia kursaro: unua semajno.
**20-25:** Plurnivela internacia kursaro: dua semajno.
**Aŭguste 02-06:** Naturamika kaj romanĉa semajno en Engadino (konfirmota).
**07-14:** Kultura esperanto-semajno. En la programo: muziko, teatro, prelegoj, studgrupoj, atelieroj, ekskursoj kaj simpozio pri la esenco kaj estonteco de Esperantio (en kongresejo kun teatro).
**14-21:** Seminario por la trejnado de kulturaj manaĝeroj kunlabore kun TEJO (parte ekster la domo Naville).
**Septembre 25-26:** Kultura semajnfino pri muziko, prelegos kaj kantos Georg Roessler kaj Jean-Thierry von Büren (konfirmota).

Sekvos aliaj kulturaj semajnfinoj en oktobro kaj novembro, kaj zamenhofologiaj tagoj en decembro 2004.

Interesatoj petu la detalan informilon.

-oOo-

# SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud EGGENBERGER, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur & 052 233 47 64
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

### La 56-a IFEF-Kongreso okazos de la 8-a ĝis la 15-a de majo en la hungara urbo Sopron.

Interesatoj, ne necese fervojistoj, petu la kongresan anoncilon al s-ino Gertrud Eggenberger.

### Ĝenerala Kunveno de SAEF

La ĝenerala kunveno de SAEF okazos la 3-an de aprilo en Rotkreuz. Informoj aperos en la marta numero de *Svisa Fervojisto.*

# Svisa ILEI-Sekcio

**La Jarkunveno de nia Svisa ILEI-Sekcio (SIS) okazos dum la renkonto de la 24-a de aprilo fine de la tagmanĝo en la Restoracio de Saut du Doubs.**

### Mallonga vivrakonto de SES.

En 1958 estis fondita Esperanto-Edukistaro de Svislando (EES), kiu rolis kiel svisa sekcio de ILEI.

En 1973 estis fondita Svisa ILEI-Sekcio (SIS).

Svislando havis la ŝancon havi kulturcentron KCE (fonditan en 1968 kaj establitan en La Chaux-de-Fonds en 1974), kie ĝis 1994 la geinstruistoj povis veni kaj lertiĝi. Tio okazis pro la ĉeesto tie de Claude Gacond, mond-fama pedagogo, kaj poste de Mireille Grosjean, kiu organizis renkontiĝojn por instruistoj. Do dum 20 jaroj mult-nombris la kursoj, ĉu por komenc-antoj, ĉu por progresantoj, ĉu por ge-instruistoj.

Post 1994 Claude Gacond ŝanĝis la lokon de sia instruado kaj la interes-atoj sekvis lin al la urba biblioteko, kie situas la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Lingvo Internacia (CDELI). Ĝis hodiaù (2004) okazadas tie renkontiĝoj kun prelegoj, kursoj, studsabatoj, paroligaj rondoj, pedagogiaj renkontiĝoj. La aktivecoj de Claude Gacond okazas sub la aŭspicio de SIS. SIS organizas neniun kunvenon memstare, krom ĝeneralan asembleon unufoje jare kadre de la ĝenerala asembleo de Svisa Esperanto-Societo (SES).

En 2004 SIS grupigas 16 membrojn. Inter ili estas emeritaj geinstruistoj kaj instruistoj deĵorantaj, inter kiuj tri estas profesiaj fremdlingvo-instruistoj. Claude Gacond kaj Mireille Grosjean apartenas al la Internacia Ekzamenant-aro de ILEI.

Claude Gacond estas honora membro de ILEI.

Mireille Grosjean membras en la Internacia Ekzamena Komisiono kaj partoprenis kiel helpanto aŭ kunordig-anto en la ekzamen-sesioj de Universalaj Kongresoj en Montpellier (1998), Berlino (1999), Tel-Avivo

(2000), Fortalezo (2002) kaj Gotenburgo (2003).

Tiun ĉi rememorigan historieton Mireille Grosjean verkis helpe de teksto de Andy Künzli por la aperonta Svisa Enciklopedio).

# UEA

## Ĉefdelegito en Svislando

François RANDIN

Av. de Chailly 10, CP 246, 1000 Lausanne 22.
Tel. 076 411 14 55, fakso 021 657 14 56.

Ret-adreso: esperanto@isuisse.com
poŝtkonto: 10-121498-1

**Pri la 89-a Universala Kongreso**

La venonta Universala Kongreso okazos en Pekino (Ĉinio) inter la 24-a kaj la 31-a de julio. Interesatoj mendu la aliĝilon al François Randin. La kongreskotizo ĝis la 31-a de marto estas Fr. 285. Poste ĝi estops Fr. 345.

Estas propono de Kuoni pri vojaĝo malmultekosta al Pekino.

La Agentejo vojaĝa Helvetic Tours proponas flug-vojaĝon al Pekino per Lufthansa tra Frankfurto: Fr. 1200. Interesatoj petu la aliĝilon al François Randin.



# Loka vivo

## Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12
Kunvenoj: 20h00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Novaĵoj ne venis pri la societa aktiveco mem, sed anonciĝis, ke grupo da bazel-anoj ne nur partoprenos la jubilean renkonton de la 24-a de aprilo en Les Brenets, sed ankaŭ la sekvan semajn-finon en Tête de Ran.

Povu multaj grupoj ilin imiti, ne nur cele al plukado de jonkviloj, sed anakŭ al kreskigo de la intergrupaj amikecoj

-oOo-

# Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"
Case postale 188, 1211 GENÈVE 20
Espéranto-infos: & 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio *«Aux Cheminots»*, 7, rue des Gares, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 19-a horo.

## Raporto

11 stelanoj partoprenis la kunvenon de la 6-a de januaro, en kiu venis kelkaj proponoj: interrete dissendi la bultenon *Brasikfolio* por ŝpari sendokostojn, aliĝi al la Domo de la Asocioj por ricevi lokon en la "Village alternatif" de la Libro-Foiro 2004, organizi telefonan reton inter la membroj sen interreto por la anonco de urĝa evento.

La 20-an de januaro mortis Marcel Moreillon en sia 97-a jaro. Tiu afabla aktiva membro de La Stelo ŝatis akceptis samideanojn en sia hejmo.

Anonc-kampanjo estas organizata en la taggazeto *Le Courrier*.

## Venontaj kunvenoj

**Aprile 6**: Temo: La Ĝeneva Libro-Foiro 2004.
**Maje 4, junie 1.**
**Julie 17** sur la Insulo J.-J. Rousseau:
**Aŭguste 14**: Sur la Insulo Rousseau:
**Septembre 7, oktobre 5, novembre 2. decembre 7.**

-oOo-

# Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo
Case postale 389, 1009 PULLY
Tel: 021 729 58 02
<esperanto@isuisse.com>
<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

## Kunvenoj

**Aprile 5:** Kun Claude Gacond: Kiel prezenti esperanton al ĝenerala publiko, al instruistoj, al poliglotoj. Kaj respondado al eblaj demandoj de la grupanoj.
**Maje 3:** (programo decidota).
**Junie** okazos ekskurso.

## Raporto

Dum la renkonto de la 5-a de januaro François Randin proponis diversajn ŝanĝojn en la organizo de la grupo prepare al la ĝenerala asembleo. Kaj poste Laurent Burgbacher ludigis la grupon dum unu horo tiel agrable, ke la tempo pasis tro rapide por ĉiuj.

La ĝenerala asembleo de la 2-a de februaro decidis, ke François Randin kaj Laurent Burgbacher respondecos pri la gvido de la aktiveco de la societo kunlabore kun la ĝisnunaj gvidantoj.

Charlotte Blanc-Maillard estis vigle apogata dum la tuta februara monato de pluraj membroj de LES por la prizorgo de la ekspozicio pri esperanto en Vevey.

-oOo-

# Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj:
Hotelo Steghof, Voltastrasse 2, atingebla de la stacidomo per la trolebusoj 4 kaj 5.
Restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14.

## Kunvenoj

**Aprile 7:** Steghof: 14h00 kun Franz Brügger: Paroliga leciono; 14h30 kun Annelies Dettling: Sciindaĵoj kaj originalaĵoj el la pasinteco de la urbo Lucerno.
**Maje 5:** Simplon: 1400-16h00: Konversacio kun Franz Brügger.
**Junie 2:** Steghof: 14h00 kun Franz Brügger: Paroliga leciono; 14h30 kun Sonja Brun: Henri Dunant, samtempulo de L. L. Zamenhof.
**Julie 7:** Simplon: 1400-16h00: Konversacio kun Franz Brügger.
**Aŭguste 7:** Ekskurso duontaga.
**Septembre 1:** Simplon: 1400-16h00: Konversacio kun Franz Brügger.
**Oktobre 6:** Steghof: 14h00 kun Franz Brügger: Paroliga leciono; 14h30 kun Dieter Rooke: Pri la Universala Kongreso en Pekino.
**Novembre 3:** Simplon: 1400-16h00: Konversacio kun Franz Brügger.
**Decembre 1:** Steghof: 14h00 kun Franz Brügger: Paroliga leciono; 14h30 kun Paul Scherer: Zamenhofologio kaj programo 2005.
**2005 januare 5:** Simplon: 1400-16h00: Konversacio kun Franz Brügger.

-oOo-

# Kantono de Neuchâtel

## La Chaux-de-Fonds

### Studaj rondoj ĉe CDELI

Kiel tasketo por la vespero de la 20-a de januaro estis proponita esperantigo de la unua paĝo de historieto de la neŭŝatela sekcio de la Svisa Alpa Klubo. Kaj André Sandoz, kiu multe legas, promesis prezenti romanon de Serge Elgo, kion li faris en februaro vekante al legemon de liaj du aŭskultantoj. Sekvis korektado de la historia raporto pri la unuaj jaroj de la neŭŝatela alpa klubo. La koncerna teksto indas je publikigo en venonta numero de *SES informas*.

Kiuj ŝatas praktiki esperanton, tiuj notu la datojn de la venontaj vesperoj: marte 23, maje 4 kaj 18, junie 8 kaj 22, de la 20h00 ĝis la 21h45 en la salono de CDELI.

# Vevey

## L'espéranto

### une langue bien vivante

#### Ekspozicio en "Magasin du Monde"

De la 6-a ĝis la 28 de februaro la klientoj de *Magasin du Monde*, rue du Conseil 20 en Vevey, povis malkovri esperanton dank'al ekspozicio, kiun Charlotte Blanc-Maillard kaj Yvette Goy muntis kun la helpo de CDELI. La

vendredon 6-an de februaro la inaŭguron de la ekspozicio frekventis kvardeko da personoj tre interesataj. Claude Gacond respondis iliajn demandojn ekde la 17-a ĝis la 20-a horo. La sekvajn tagojn sindonemaj esperantistoj laŭ kalendaro planita de Charlotte Blanc-Maillard deĵoris, por esti pretaj respondi al informpetoj de vizitantoj. La redakciojn de la regionaj gazetoj kaj la direkciojn de la lernejoj informis afiŝoj kaj klarigoj dissenditaj de CDELI.

La estonto montros, ĉu la koncerna ekspozicia aktiveco alportos kontentigajn rezultojn. Sed ni memoru, ke por porti fruktojn semo bezonas longan tempon de maturiĝo.

# Wil

## Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE, Lettenstrasse 70, 9500 Wil. Tel.: 071 911 68 30.
Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER, Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil. Tel: 071 393 41 49.
Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntis-strasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

## Venontaj kunvenoj

**Aprile 7:** April-ŝercoj kun Lilian Sigriest.
**Maje 5**: Esperanto-testo kun Barbara Pochanke kaj Lilian Sigriest.
**Junie 2:** Escepte je la 16h00: Eta solenaĵo: **40 jarojn de Esperanto en Wil.**

# Zürich


## Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld
Tel.: 044 251 50 25 <info@esperanto.ch>
reto: www.esperanto.ch/zuriko

# Programo

**Konversacia Studrondo merkrede 16.00-17.00**
Ĉiun merkredon.
Aliĝo ĝis la tago antaŭa. Tel: 044 251 50 25 aŭ retpoŝto info@esperanto.ch (kotizo se 2 partoprenantoj po Fr. 20.-, se 3 po Fr. 15.-, se 4 aŭ pli po Fr. 12.-)
[Konversationsstudienrunde jeweils Mittwoch 16.00 – 17.00: Jeden Mittwoch Nachmittag. Anmeldung jeweils bis am Vortag unter Telefon 044 251 50 25
oder E-Mail info@esperanto.ch. (Kurskosten bei 2 Teilnehmern Fr. 20, bei 3 Teilnehmern Fr. 15 bei 4 oder mehr Teilnehmern Fr. 12.-)]

**Malfermita Kafejo/Klubo dimanĉe 14.00-17.00**
Dimanĉe de la 14.00 – 17.00 la Esperantejo estas malfermita al esperantistoj, krokodiloj, geamikoj kaj interesuloj por ludoj, konversacio kaj kafumado, regule ankaŭ okazas prezentaĵoj.
Sonntags von 14.00-17.00 ist das Esperantejo geöffnet für Esperantisten, Nicht-Esperantisten, Freunde und Interessenten für Spiele, Konversation und Kaffee.



# Kongresen

# Manifestacio en Strasburgo

**Loko:** La Europa Ponto en Strasburgo (Francio).
**Dato:** Dimanĉon la 9-an de majo 2004 (Tago de Eŭropo).
**Organizado:** Libera elekto de la lingvo por la flagrubandoj; libera enteno de la flagrubandoj (respektante deklaron de homaj kaj eŭrop-civitanaj rajtoj).

La tempo pasas. Ni devas urĝe plani nian vojaĝon al Strasburgo. Ĉar ĝi estas longa, ĉefe por romandoj, mi proponas al vi semajnfinan vojaĝon. Mi petis proponojn per aŭtobuso kaj per trajno, sed ne ricevis respondon por la redakta limdato de *SES informas*. Tial mi petas la interesatojn turni sin al mi por ricevi proponojn. Mi ankaŭ sendos tiujn ĉi proponojn kun prezoj al la lokaj societoj kaj per la svisa retlisto ĉirkaŭ la 21-an de februaro. Mi proponos tri-stelan hotelon, sed ankaŭ junularan gastejon aŭ ion similan. Sed pensu, ke la aliĝoj devos jam alveni al mi, post la propono, **komence de marto.**

Tiu manifestacio estas ege grava. Okazas nuntempe multaj diskutoj en la Komisiono kaj en la Parlamento Eŭrop-Unia pri manko de lingva demokrateco. Sed por multaj homoj esperanto ne estas serioza solvo. Tial ni devas montri, ke ni estas pli gravaj, nombre kaj kulture, ol opinias la ĝenerala publiko. Ne forgesu inviti viajn amikojn neesperantistajn, kaj informu, se vi konas, interesatajn asociojn, kiuj ankaŭ konscias pri la nunaj lingvaj problemoj.

Por informo: **http://europa.bunto.free.fr**

**Programo :**
09h00: Rendevuo ĉe *Place de l'Université* de Strasburgo.
11h00: Bonvenigaj vortoj de la organiz-antoj kaj de la delegacioj.
11h30: Manĝo kaj pikniko.
12h30: Koncerto de JoMo - Jean-Marc Leclerc de Tolosa, kiu kantas en pluraj lingvoj (laŭ Guiness Records).
14h00: Ekstarto de la manifestacio. Ne rapida iro tra *Allée de la Robertsau* kaj *Avenue de l'Europe,* parado, sloganoj, banderoloj, flagoj, kantoj, dancoj.
15h30: Alveno je *Orangerie* (apud Eŭropaj Parlementejo kaj Konsilio).

16h00: Fina parolado de grava eŭropa respondeculo.
17h00: Gazetara konferenco. Disiĝo de la manifestacio kaj eble ĝis venonta fojo (?).

**Nicole Margot, Lys 4, 1010 Lausanne.**
**Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch**
**Tel: 021 653 14 67**

# Esperanto en la uragano de ideologioj

Internacia Esperanto-Simpozio
8-9-ajn de oktobro en

## Aŭstria Nacia Biblioteko

La 8-an kaj 9-an de oktobro 2004 Aŭstria Nacia Biblioteko en kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio organizos simpozion okaze de du esperanto-jubileoj: la centa datreveno de la naskiĝo de Lidia Zamenhof (1904–1942) kaj la 75-jariĝo de Internacia Esperanto-Muzeo (IEM, aligita al Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929).

Prelegos Ulrich Lins (Germanio / Japanio, ĉefpreleganto), Vilmos Benczik (Hungario), Wera kaj Detlev Blanke (Germanio), Heiner Eichner (universitato de Vieno, Aŭstrio), Alex Kaefer (Aŭstrio), Herbert Mayer (IEM, Aŭstrio), Claude Piron (Svislando).

La historio de esperanto kaj la sorto de esperantistoj estas firme ligitaj al la ĝenerala historia evoluo. Verki historion de esperanto signifas verki kadre de la historio de la mondo. Tion montris Ulrich Lins per *La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ esperanto".* Esperanto do ne estas io ekzotika kaj marĝena, kiel foje opinias la ĝenerala publiko, sed ĝi estas integra parto de historiaj evoluoj.

Tiu fakto estas la elirpunktoj de la simpozio, kiu pritraktos la destinon de esperanto en la politikaj-ideologiaj uraganoj de la pasinta jarcento, fokusante interalie la atenton al la sorto de Lidia Zamenhof (murdita en la koncentrejo Treblinka en 1942) kaj de Internacia Esperanto-Muzeo (fermita en 1938 fare de la nazioj). Apud tio pritraktiĝos ankaŭ temoj, kiuj tuŝas la nuntempon: Kia estas hodiaŭ la situacio de esperanto en la mondo? Kiel aspektas la rilato inter esperanto kaj la nunaj politikaj regantoj? Kiel kondutu la esperantistoj en mondo, kiu almenaŭ en la publika diskurso ege malfavoras la ideon de artefarita internacia helplingvo, sed aliflanke pere de modernaj teknologioj ofertas novajn eblecojn?

La laborlingvo dum la unua duontago de la simpozio estos la germana por la ne-esperanta publiko – la cetero disvolviĝos en esperanto.

Paralele okazos: malfermo de ekspozicio pri la sama temo en Internacia Esperanto-Muzeo, prezento de la noveldonita plena verkaro de Lidia Zamenhof kaj internacia ***Cseh-kurso por tutkomencantoj***.

(La germana nomo de la aranĝo estas: Die gefährliche Sprache)

Partoprenkotizo: 50 €, por studentoj kaj lernantoj 35 €. Aliĝo:

plansprachen@onb.ac.at